REVUE SPIRITE
Journal d'Études Psychologiques
Fondée par ALLAN KARDEC

ISK
INTERNACIA SPIRITISMA KONSILIO



Plureco de la **Mondoj**

Estas multaj loĝejoj en la domo de la Patro

Selektitaj Artikoloj

Jaro 167 | N- 17 | 2024

Ĉi tiu volumo enhavas kelkajn artikolojn el la Revuo Spirite de la jaro 167, oktobro 2024 numero 17. Ĉi tio ne estas kompleta versio. Tradukoj estas respondeco de la tradukinto.
.

TRADUKISTOJ KAJ REVIZIISTOJ EN ĈI TIU NUMERO

SAULO SALGADO WANDERLEY
JOSÉ ROBERTO ALVES DE ALBUQUERQUE
GIVANILDO RAMOS COSTA

Revue Spirite
Journal d`Études Psychologiques
Fondée par ALLAN KARDEC le 1er janvier 1858

Havaĵo de la Internacia Spiritisma Konsilio (CEI)
Logo et Marque Européenne enregistrée à l'EUIPO (Office de l'Union Européenne pour laproprieté intellectuelle)
® Komerca marko 018291313
Mark française déposée à l'INPI (Institut National de la Propriété Intellectuelle) sur le numéro
® 093686835.

LA REVUE SPIRITE

Redaktita de
Federação Espírita Portuguesa
Praceta do Casal Cascais 4, r/c, Alto da Damaia, Lisboa
ISSN 2184-8068
Depósito Legal 403263/15
© copyright 2024
Jaro 167
N°17
CSI | Kvaronjara | oktobro 2024
Senpaga distribuo

Direkto (ISK)
Jussara Korngold

Kunordigo (FEP)
Vitor Mora Féria

Redakcia kunordigo
Sílvia Almeida

Skribo kaj provlegado
Cláudia Lucas
José Carlos Almeida

Web

Marcial Barros
Nuno Sequeira
Sandra Sequeira

Arto & Dezajno
Sara Barros

revuespirite@cei-spiritistcouncil.com
www.cei-spiritistcouncil.com

Indice

JUSSARA KORNGOLD	ĈEFARTIKOLO
DALVA SILVA SOUZA	REVIZITANTE LA SPIRITISMAN REVUON
	PLURECO DE LA MONDOJ
EL LA SPIRITO YVONNE A. PEREIRA	FAMILIAJ PAROLADOJ DE TRANSTOMBO
	NUNE MEDIUMECO KAJ
	MEM-MORTIGOSPIRITISMO
HUMBERTO SCHUBERT COELHO	SPIRITISMO KAJ SOCIO
	AKCEPTO DE LA LIBRO VIVOSCIENCO
	POST LA MORTO
REDAKTEJO DE SPIRITISMA MOMENTO	SPIRITISMA MOMENTO
	ALIAJ LOĜEJOJ...

ĈEFARTIKOLO

JUSSARA KORNGOLD

La Plureco de Loĝataj Mondoj: Reflekto el Spirita Perspektivo

La ideo, ke ekzistas aliaj loĝataj mondoj, ĉiam vekis profundan scivolemon kaj elvokis signifajn pripensojn. Tiu koncepto ne nur unuiĝas kun scienca esplorado kaj spirita kompreno, sed ankaŭ plivastigas la homan vizion pri sia rolo en la universo, proponante pli ampleksan kaj signifan perspektivon pri nia loko en la kosmo.
Sciencaj progresoj ĉiam pli proksimigas nin al la eblo malkovri vivon ekster la Tero. La identigo de multaj eksterplanedoj, precipe tiuj situantaj en regionoj konsideritaj loĝeblaj, pligrandigas la atendon, ke ekstertera vivo eble troveblos. La diversaj spacaj esplormisioj, kiuj esploras kaj la surfacon de planedoj kaj la ekziston de favoraj kondiĉoj en aliaj ĉielaj korpoj, alproksimigas nin al la respondo de unu el la plej antikvaj demandoj de la homaro: Ĉu ni estas solaj en la universo? Tiel, scienco ludas gravan rolon en la serĉado de respondoj pri la ekzisto de aliaj loĝataj mondoj, provizante indicojn, kiuj invitas nin reflekti pri la vasteco kaj komplekseco de la kosmo.
La Spiritismo, siavice, proponas profunde riĉigan vidon pri la plureco de loĝataj mondoj, kompletigante la sciencan perspektivon per spirita dimensio. Laŭ la instruoj de Allan Kardec, la universo estas plena je vivo en diversaj stadioj de morala kaj intelekta evoluo. Ĉiu planedo estas konsiderata unika medio, kie la animoj povas lerni kaj evolui, substrekante, ke la vivo estas dia donaco disvastigita tra la tuta kosmo. Tiu koncepto plivastigas la ideon de vivo, sugestante, ke ĝi ekzistas ne nur en fizikaj formoj, sed ankaŭ en spiritaj sferoj, kie la estaĵoj daŭrigas sian vojaĝon de kresko kaj iluminiĝo.
Reflekti pri la ekzisto de aliaj loĝataj mondoj ne nur vekas la homan imagon kaj scivolemon, sed ankaŭ fortigas la senton de konekto kaj respondeco. La serĉado de ekstertera vivo iras preter la simpla malkovro de aliaj formoj de vivo; temas pri kompreni nian komunan vojaĝon kaj nian rolon en la vasta universo. Tiu reflekto reliefigas nian partoprenon en vasta reto de interkonektita vivo, kiu ĉiam evoluas kaj lernas, kie ĉiu estaĵo, en ajna parto de la kosmo, kontribuas al tiu granda spirita kaj kosma aventuro. El la spirita vidpunkto, ni estas instigitaj plivastigi nian vizion pri vivo kaj ĝia vasta diverseco, rekonante, ke la universo estas dinamika scenejo por lernado kaj spirita evoluo, kie ĉiu estaĵo, dum sia vojaĝo, ludas gravan rolon en la harmonio kaj progreso de la tuto.

REVIZITANTE LA SPIRITISMAN REVUON
PLURECO DE LA MONDOJ

DALVA SILVA SOUZA

BIO:

Dalva Silva Souza estas diplomita pri Beletro, verkistino kaj spiritisma prelegantino. Nuntempe ŝi kunordigas la Evangelian Studcentron en la Spiritisma Federacio de la Ŝtato Sankta-Spirito.

TRADUKISTO:

José Roberto Alves de Albuquerque

REVIZIISTO:

Givanildo Ramos Costa

RESUMO:

Jesuo instruis, ke estas multaj loĝejoj en la domo de la Patro. Konsiderante tiun instruon, Spiritismo prezentas, kiel unu el ĝiaj bazaj principoj, la plurecon de la loĝataj mondoj. Hodiaŭ pro la scienca avanco kaj Spiritismaj informoj, kiam ni rigardas la stelplenan ĉielon, la afero ekaperas en nia menso kun fascinaj nuancoj, ĉar ni povas pensi pri la multoblaj eblecoj sekvontaj.

ŜLOSILVORTOJ:

Universo, planedoj, inteligenta vivo, diverseco, respekto

En la Spiritisma Revuo de marto 1858, Allan Kardec enkondukas diskuton pri la plureco de la loĝataj mondoj, unu el la principoj de la Spiritisma Doktrino. Li mencias, ke estas argumentoj kontraŭaj al tiu propozicio kaj li studas la temon, konsiderante ke "(...) naŭzas la rezonon kredi, ke tiuj nenombreblaj globoj cirkulantaj en la spaco estas nur inertaj kaj neproduktivaj masoj". (Kardec 2004, 110)

En la antikvaj tempoj, la Tero estis vidata kiel la kosmocentro, sed, memorante la metaforon prezentitan de la Kodiginto, ni bezonas konstati, ke ni estas nur unu el la multnombraj insuloj en la vasta kosma oceano.

Rigardante la Universon per scienca perspektivo, ni plibone povos kompreni la lokon de la Tero. Per potencaj teleskopoj kaj spacaj misioj, la homo jam esploris aliajn ĉielajn korpojn, de planedoj en nia sunsistemo ĝis eksterplanedoj orbitantaj

forajn stelojn, malkovrante, ke estas abundo da mondoj ekstere, kelkaj laŭgrandece similaj al la Tero, kunmetaĵo kaj eĉ kondiĉoj favoraj al loĝado.

Kiam oni rigardas tiun vastecon, estas nature demandi nian pozicion kaj relativan gravecon. Kial, meze de tiom da bilionoj da planedoj, la Tero estus la nura loĝigi intelektan vivon? La respondo povas ne esti tiel simpla kiel la koncepto de speciala loko en la Universo. La vivo, kiel ni ĝin konas, rezultas el kompleksa kombinado de mediaj kondiĉoj kaj biologiaj procesoj. Kvankam estas malofte trovi planedojn enhavantajn ĉiujn necesajn kondiĉojn por la vivo laŭ ni konas, la skalo de la Universo sugestas, ke, statistike, devas esti multnombraj aliaj mondoj kie vivformoj povas ekzisti.

Krome la kompreno de la kosma evoluo igas nin percepti, ke la tempo estas nepra faktoro. La Tero ekzistas de ĉirkaŭ 4,5 bilionoj da jaroj, sed la Universo havas ĉirkaŭ 13,8 bilionojn da jaroj. Tio signifas, ke estis tempo pli ol sufiĉe por ke la inteligenta vivo aperus kaj disvolviĝus aliloke, malgraŭ tio, ke ni ne detektis ĝian signon ĝis nun.

Do tiel kiel estus absurde la loĝantoj de eta izolita insulo kredi, ke ili estas la nuraj estuloj sur la Terglobo, ankaŭ ĝustas kontraŭstari la ideon pri tio, ke la Tero estas unika loĝigi intelektan vivon en la vasta kosmo. Nia kompreno pri la konstanta evoluo de la Universo invitas nin pliampleksigi niajn horizontojn kaj konsideri la eksterordinarajn eblecojn ekzisti intelektan vivon krom la limoj de nia planedo. La Spiritoj instruas, ke ĉiuj mondoj estas loĝataj de estuloj alĝustigitaj al la fizika konstitucio de ĉiu globo, povante tiuj loĝantoj esti pli aŭ malpli evoluintaj ol ni.

La serĉo por kontakto kun eksterteranoj estas de kelka tempo unu el la plej fascinaj kaj persistaj en la historio de la spaca esploro kaj en la scienco ĝenerale. Unu el la plej ordinaraj laboroj estas la serĉo por radisignaloj venantaj el la spaco. La sciencistoj uzas raditeleskopojn por zorge esplori la kosmon serĉe modelojn kaj signalojn indikantajn artefaritan intelekton. Alia provo estas dissendi mesaĝojn al la spaco, kiel la ora disko en la spacaj sondiloj Voyager, enhavantaj sonojn kaj bildojn de la Tero. Iuj el la sondiloj esplorantaj la sunsistemon portas tabulojn, kiuj povas esti interpretataj kiel reprezentaĵoj de la Homaro. Tiaj iniciatoj elmontras, ke la ebleca ideo de vivo ekster la Tero estas ordinara inter la sciencistoj. Ĝis nuntempe, tamen, ni ne havas noticojn pri kontentiga rezulto de tiuj provoj kaj, el la kaŭzoj laŭ kiuj neniu el tiuj iniciatoj alportis iun ajn respondon, la plej ĝusta eble estas tiu, kiu mencias la grandegajn distancojn inter la planedaj sistemoj, apartigitaj unu de la aliaj je miloj aŭ milionoj da lumjaroj

La fakto estas, kiel prave konkludis Kardec, ke la spaco estas loĝata de inteligentaj estuloj, nevideblaj al la enkarniĝinto: “Tiel ĉio estas loĝata en la Universo, la vivo kaj la inteligenteco estas ĉie: sur la solidaj globoj, en la aero, en la internaĵoj de la Tero, kaj eĉ en la profundoj de la etero. Ĉu estas io, en tiu doktrino, kiu kontraŭstaras la rezonon? Ĉu ĝi ne estas samtempe grandioza kaj sublima? Ĝi nin levas pro nia propra malgrandeco, tute kontraŭa al tiu egoisma kaj malnobla penso, kiu konsideras nin kiel la nurajn estulojn indajn okupi la penson de Dio”. (Kardec 2004, 112)

La ideo "estas multaj loĝejoj en la domo de la Patro", instruita de Jesuo, povas esti vidata kiel spirita perspektivo eĥanta la sciencajn spekulaĵojn pri la ebleco de ekstertera vivo. La deklaracio de Jesuo sugestas, ke la Dia regno estas vasta kaj

povas esti diversa, plena de vivo je ties pluraj formoj, memorigante nin, ke, samkiel estas diverseco de homoj kaj kulturoj sur la Tero, ankaŭ povas ekzisti diverseco de vivformoj en aliaj partoj de la kosmo.

La serĉo por ekstertera vivo kaj la Universa esploro reflektas ankoraŭ nian bezonon ampleksigi niajn horizontojn kaj serĉi pli profundan komprenon de nia propra loko, nin stimulanta adopti konduton de respekto kaj ŝato por la vivo je ĉiuj siaj formoj. Tiuj pripensoj nin instruas ankoraŭ, ke niaj fizikaj sensoj estas limigitaj kaj, do, ni bezonas disvolvi la humilecon kaj spiritualiĝi, cele kompreni la vastecon, diversecon kaj kosman misteron.

BIBLIOGRAFIO

KARDEC, Allan. 2006. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* [Traduko de Guillon Ribeiro]. Rio-de-Ĵanejro: FEB.
KARDEC, Allan. 2008. L*a Genezo*. [Traduko de Guillon Ribeiro]. Rio-de-Ĵanejro: FEB.
KARDEC, Allan. 2004. "Plureco de la Mondoj". Spirita *Revuo*. Braziljo: FEB. [Jaro 1, N-ro. 3, (marto 1858): 109-112].

FAMILIAJ PAROLADOJ DE TRANSTOMBO NUNE MEDIUMECO KAJ MEM-MORTIGO

TRADUKISTO: Saulo Salgado Wanderley

Verkis Yvonne A. Pereira
Mediumo Alexandre Pereira

Mediumeco estas tiel kiel la aro de steloj, kiuj punktas la firmamenton, pro malkaŝi la grandiozecon de la Kreinto, por prilumi estaĵojn, mondojn, formojn, kaj por esprimi la bezonon de ordigo, per la disciplino kaj kohereco de moralaj kaj spiritaj principoj, kiuj ĉirkaŭas ĝin. Tial, por ke ĝi estu tiel nobla, estas necese ke ni ekzercu ĝin per maniero kiu ekzempligu la ĉielecon de tiuj, kiuj servas kiel kaŝitaj voĉoj, estante la ĉefaj en tia afero.

Kun tiu mediumeco ni estas tiuj, kiuj ricevas la patran kompaton de la Sinjoro, en konstanta helpo kaj ĉiutaga plifortiĝo. Kvazaŭ ni havus naskiĝantan planton, kun malforta tigo, kaj ni bezonus alkroĉi al ĝi bastoneton, por ke vento kaj ŝtormo ne rompus ĝin.

Tra la vivo, demandoj kaj revolucioj de la animo, inkluzivante la ideon pri memmortigo, ni povas trovi en bone praktikata mediumeco formon de subteno, rimedo, por mildigi recidivojn, protekti nin en la momentoj en kiuj timo, ideo pri fino, konstanta memmalvalorigo, trovas ŝirmon en niaj mensoj.

Eble, bezonante vivi favore al aliuloj, servante senkondiĉe en amaj sintenoj, ni estos pli favorataj ol favorantaj. Io por ĉiam pripensi: servi por vivi.

Kiam sur la Tero komenciĝas enangoraj tagoj, ĉu pro la revolucio de egoisma pensado, ĉu pro la malforteco de tiuj, kiuj serĉas sian plej bonan kondiĉon koste de io ajn aŭ de iu ajn, ni povas nur serĉi oazon de vivo. Plibonigi kunvivadon kaj renkonti la plej grandajn celojn de la vivo, kiuj lokas nin en ĉi tiun oazon. Ne estos la tagoj de maldaŭra amuzo aŭ senbrida konsumo, kiuj kondukos vin al la feliĉo, bonfarto kaj aprezo de la vivo. Nur tio, kion ni faras en la amo, kiel Jesuo instruis al ni, igos nin marŝi laŭ la ĝustaj vojoj.

Ĉio, kio ŝajnas monstra kaj opresema, trovu la mildecon de la vivspertata amo - Ekster Karitato ne ekzistas savo.

Fidu, sekvu, batalu kaj precipe rigardu la mondon kun la eblecoj de bono, kiujn Dio oferis al ni.

Estas neniu, kiu ne povas vidi lumon antaŭen, kiom ajn malhela kaj nebula estas la nuntempo.

Paco en la koroj!

Yvonne do Amaral Pereira

SPIRITISMO KAJ SOCIO
AKCEPTO DE LA LIBRO VIVOSCIENCO POST LA MORTO

HUMBERTO SCHUBERT COELHO

TRADUKISTO:	José Roberto Alves de Albuquerque
REVIZIISTO:	Givanildo Ramos Costa

En 2022, estis lanĉita la libro Vivoscienco post la morto, kiu intencis sintezi ĉiun sciencan evidentaĵon ekzistantan pri la afero, klarigante la implikaĵojn de tiu evidentaĵo kaj kial ĝi ne ricevis sufiĉan atenton de la scienca komunumo. La libro havas multfakan naturon, temanta unue pri psikologio, verkita de du psikiatroj (Alexander Moreira-Almeida kaj Marianna de Abreu Costa) kaj unu filozofo (mi), ĉiu kun almenaŭ dudek jaroj da dediĉo al tiu esploro.
La centra tezo de la libro kaj la plej bonaj evidentaĵoj en ĝi prezentitaj estis temoj de multaj konferencoj, artikoloj en ĵurnalo kaj revuo, kaj akademiaj priskriboj. Tiu sperto ebligis al ni, la aŭtoroj, altvaloran vidadon pri la arta stato de tia esploro, kaj scii kiel la libro estis akceptita.
Invitita de la Spirita Revuo, mi kolektis kelkajn informojn rilatajn al la impreso de la libro, kaj pri la motivoj laŭ kiuj la libro estis aprezita kaj atakita.
Angle eldonita, Science of life after death ricevis 17 priskribojn en sciencaj revuoj, iuj el ili ĉe la plej gravaj gazetoj en la mondo, kiel British Journal of Psychiatry. Alia tre grava gazeto kadre de la psikiatria areo, International Review of Psychiatry, invitis la tri aŭtorojn organizi volumon pri la afero, kun eldona libereco por sugesti nomojn de aliaj esploristoj. En Brazilo, la portugala traduko naskis fortajn rezultatojn en eventoj kaj ĵurnaloj, aperante en la tri plej grandaj ĵurnaloj de la lando (Folha, Estado de São Paulo, O Globo). Perfekta priskribo, elstarante la logikajn kaj epistemologiajn aspektojn de la afero, estis publikigita en la revuo de la Brazila Asocio pri Filozofio kaj Religio. La libro estis tradukita en la hispanan kaj la tradukoj en la germanan kaj francan estas finiĝontaj. Ni ricevis invitojn al pli ol tri dekoj da eventoj por lanĉo ĉe universitatoj kaj sciencaj kongresoj, Brazile, Portugalie, Anglie kaj Usone. Ili estas nekutimaj numeroj pri akademiaj laboroj, kaj, almenaŭ en mia areo, mi neniam aŭdis paroli pri libro ricevinta pli ol du aŭ tri priskriboj.
Honeste, kvankam ni konsciis pri tio, ke ni faras ion revolucian en la akademia kampo, ni ne kalkulis je tiel forta reago kaj foje tiel intensa de iu komunumo, kiu ricevas kritikege ĉiujn aferojn. Multegaj aŭtoritatuloj, kiujn ni ne imagis eĉ simpatiaj al la temo, publike venis kun entuziasmaj apologioj. Tio nin helpis

rekalkuli la esperan dimension de la internacia akademia komunumo pri tiaj temoj kaj metodo.
Kiel iu ajn povas bone imagi, tamen, ne ĉiuj reagoj estis simpatiaj kaj kuraĝigaj. Perfortaj repuŝaj reagoj venis el parto de la publiko kaj konatoj; homoj el kiuj ni ne esperis malnoble kaj ege malrespekteme atakojn al niaj honoro kaj inteligenteco. Feliĉe neniu el tiuj atakoj ekvenis de iu esploristo, lasante al ni la pozitivan impreson pri kiu la antaŭjuĝoj kontraŭ la spiritualisma esploro disas inter la plej edukitaj klasoj de la loĝantaro kaj, ĉe la akademio, ĝi limiĝas al profesoroj ne engaĝitaj en scienca esploro. Tiu punkto meritas pli grandan atenton.
Granda parto de la sukceso koncerne la libro-prezentojn rilatis la objektivecon kiel la esploro estis prezentita, ne lasante spacon al la subjektiveco, aferoj de gusto aŭ persona opinio. Ekde la libro-verkado, ni provis teni nur la evidentaĵojn, sen eltiri filozofiajn konkludojn pri la signifo de tiuj evidentaĵoj cele supozitan spiritualisman naturon de la realeco, kaj ne entuziasmiĝis pri la enhavo de la propraj raportoj, en kiujn ĝenerale la homoj enmetas konkludojn pri la spiritualisma vivo. Apartigi la valoron strikte sciencan de tiuj raportoj forigas la plej grandan parton el ili, ilin reduktante al malmulte diskutindaj kaj universalaj elementoj, kiuj ne eblas esti atakitaj kiel relativaj aŭ personaj. Krome nia sinteno ĉe la prezentadoj de la verko kaj esploro, kiu ĝin bazas, ĉiam estis agrese scienca, tio estas, ni rifuzis trakti la evidentaĵojn kaj la tezojn prezentatajn en la libro kiel pozicion submetitan al takso kaj interpretado de la legantoj kaj publiko.
Ĝenerale temoj ligitaj al spiritualeco estas prezentataj kun supozebla modesteco kiu vere reflektas malsekurecon kaj relativismon, kaj estas subtenataj per sinteno de “bonvole, ne ataku min, tiu estas nur mia perspektivo”. Malgraŭ tio, ke tiu sinteno regis ĉe akademia scenejo en la lasta jarcentduono, ĝi estas tro kontraŭscienca. La scienco estas farata sur evidentaĵoj, kaj la evidentaĵoj aŭ permesas aŭ ne permesas iun konkludon. Se ili permesas, tiuj, kiuj refutas la konkludon, agas senracie, kaj se ne permesas, tiuj, kiuj ĝin subtenas, samagas.
Serĉante la veron, kaj ne apogon aŭ malakcepton al “nia perspektivo”, ni defias ĉiun kaj iun ajn esploriston en la mondo, kiun ajn daton aŭ lokon, debati la evidentaĵojn prezentitajn kaj la argumentojn de la libro, kaj ni estos pretaj cedi tie, kie oni montros al ni la erarojn, petante nur la saman intelektan honestecon de tiuj, kiuj ne trovis mankojn en la prezentita tezo. Science ni pravas aŭ malpravas. La diverseco de modeloj kaj paradigmoj sin tenas ĉe aferoj, kie ne estas teorioj aŭ evidentaĵoj sufiĉe fortikaj, sed ili ĉiuj restas obstine konkurantaj serĉe de tiuj teorioj kaj evidentaĵoj kapablaj ĉesigi la disputon kaj klarigi kiel la naturo vere funkcias. Pro tio ke ligiĝas al religiaj ideoj, la vivo post la morto kaj la tezo de la postvivado de la homa spirito estas (malĝuste) traktataj kiel fida materio aŭ filozofia poziciiĝo, kio neas la nuran eblecon de scienca diskutado pri la sama afero. Sen tio, ke unu diskutado forigu la alian, la diskutado strikte scienca pri la afero ne povas permesi la internan relativismon de la humanisma kampo, kie la eksperimentoj estas subjektive kaj kulture interpretataj.
Por nia miro, multaj homoj – motivitaj per religiaj aŭ kontraŭreligaj /materialismaj dogmoj – ne akceptas hipoteze iun ajn sciencan diskutadon pri postvivado, insistantaj, ke tia scienco estus antaŭece neebla, “malpermesita”, kaj tio, ke la “supozitaj” evidentaĵoj eĉ ne bezonus esti analizataj, ĉar ili estas, antaŭ ĉio, kontraŭsciencaj kaj neeblaj. Tiu sinteno, tamen, estas precize la plej kontraŭscienca kaj neracia, kiun oni povas koncepti, esprimanta tutan dogman refuton al la propra scienco, kaj ne al la temo pri postvivado aŭ vivo post la morto.

La scienco ne sin inhibas antaŭ tiaj malpermesoj, kaj, malgraŭ tio, ke ili povas kulture valori kaj servi kiel baro al multaj mensoj, la libera esploro daŭre enprofundiĝos en la naturan realecon ĉiam, kiam evidentaĵoj estos disponeblaj.
Resume la kerno de la libro kaj tio, kio antaŭenigas la plej grandan parton de la esploroj pri la vivo post la morto en la tuta mondo estas la disponebleco de tiuj evidentaĵoj.

SPIRITISMA MOMENTO
ALIAJ LOĜEJOJ...

TRADUKISTO: | Saulo Salgado Wanderley

En poemo plena je steloj, la Majstro diris: *Estas multaj loĝejoj en la Domo de mia Patro.*

Kaj malfermis la Universon al ni, kun ĉiuj ĝiaj planedoj, steloj, sunsistemoj. Multaj ankoraŭ nemalkovritaj de nia teknologio. Giordano Bruno, itala filozofo, estis enfajre mortigita pro la aserto pri la senfineco de la Universo kaj la ekzisto de aliaj loĝataj mondoj.

Tamen ne povus esti alimaniere. Kial la Ĉiela Patro koncipus tiom da grandiozaĵoj, se ne por ŝirmi la estaĵojn, kiujn li daŭre kreas?

La parolado de Jesuo estas konciza, speca de grandaj saĝuloj. Kiel bonega pedagogo, Li lanĉas la ideon kaj lasas la esploradon de la makrokosmo, tra la jarcentoj, al la tera Homaro.

Estas multaj loĝejoj en la Domo de mia Patro.

Fizikaj loĝejoj, en kiuj homaroj agitiĝas, en la procezo de evoluo.

Ankaŭ spiritaj loĝejoj, por spiritoj, dum ili ne staĝas sur planedoj.

Kaj ni pensas pri kien ni iros kiam ni forlasos la karnan korpon.

Jarcentoj indikis al ni ĝojan ĉielon. Loko de ripozo, loko por fari nenion, post la luktoj de la Tero. Ni markis tion sur tomboŝtonoj ĉizante tie *Ripozu Enpace.*

Tamen, iom post iom, ni ricevas informojn el tiuj, kiuj foriris kaj loĝas en tiu alia mondo.

Kaj ni malkovras, ke ĝi estas aktiva mondo, kun organizo kaj disciplino.

Absoluta ripozo estus io terura por nia Senmorteco.

Taskoj atendas nin, en tiu loĝejo de La Patro. Ebloj de studo, plibonigo de niaj intelektaj kapabloj, preparante nin por reveni al fizika loĝejo, iam.

Konferencoj kun profunda enhavo, prezentataj de parolantoj el pli altaj sferoj, kiuj ravas kaj lumigas la inteligentecon.

Inter studado, laborado, ankaŭ ĝardenaj areoj, kun vegetaĵaro nekonata de ni, sur la Tero. Brizo balzamata de la eksplodo de floroj de multnombraj nuancoj.

Sublima muziko kvazaŭ vibrante en la atmosfero, eligata de virtuozoj per delikataj instrumentoj. Muziko kiu penetras la aŭskultantojn ege ravigatajn.

Muziko el la nemorteculoj, kiun oni aŭdas unufoje kaj neniam forgesas, kiel estas kantata en la *Poemo de Dankemo.*

Altaj teatro kaj danco, kiujn ni reproduktis sur la Tero, de tiuj, kiujn ni konsideras genioj de beleco, de la artoj, oferante al ni spektaklojn de koloroj, sonoj kaj movoj.

Kontaktoj kaj dialogoj kun mesaĝistoj de la lumo, renkontiĝoj kun niaj amatoj, el multaj vivoj.

Ŝanco rememori faktojn spertitajn en diversaj tempoj kiuj plifortigis nin en nia kondiĉo de Spiritoj.

Hejma kunvivado, ĉar tie ni kuniĝas per afinecoj kaj formas komunumojn, kiuj interagas unu kun la alia.

Loĝejoj de la Patro. Kiom da ili ekzistas, ni eĉ ne povas imagi, ĉar Li kreas senĉese.

Tio instigas nin al la progreso, al la bono, en ĉi tiu vivo, por ke ni povu supreniri kelkajn ŝtupojn en la evoluado kaj iutagon, eble ne tro malproksima, ĝui unu el tiuj amnestoj, transe.

Ekstazigi la animon, plenigu ĝin per lumo kaj entuziasmo kaj poste reveni al ĉi tiu sama surtera loĝejo aŭ al iu alia, kiun indikos Dio.

Estas multaj loĝejoj en la domo de mia Patro. Kaj ni, Liaj gefiloj, estas heredantoj de ili ĉiuj.

Redaktejo de Spiritisma Momento.

CEI

CONSELHO
ESPÍRITA
INTERNACIONAL

Social Media

Facebook

Instagram

Youtube

Online

https://cei-spiritistcouncil.com

revuespirite@cei-spiritistcouncil.com